

CxEA-RETKOMUNIKOJ estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio por cxiuj rete atingeblaj CxEA-membroj, sed ankaux senpage sendata al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne deziras ricevi ilin, sufcixas via mesagxo kun la teksto "Nesendadu" en la temlinio al <chrdle@kava-pech.cz> kaj ni tuj eligos vian retadreson el la dissendolisto.

ENHAVO

1. Libroservo kaj biblioteko de CxEA translokigxis
2. Ekoturisma renkontigxo
3. UK en Florenco
4. Internaciaj ekzamenoj ILEI/UEA unuan fojon en Cxehxio
5. Konferenco de Cxehxa Esperanto-Asocio
6. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (regula rubriko)
7. Junulara renkontigxo en Velehrad

1. Libroservo kaj biblioteko de CxEA translokigxis
bv. atenti, ke la libroservo kaj la biblioteko de CxEA translokigxis al nova adreso: Anna Vyšínková, Kollárova 131, 696 42 Vracov, telefono: 518 628 155, rete: anjivy@seznam.cz. La libroservo jam funkcias, dum la biblioteko ankoraux ne, sed gxia nova ekfunkciigo por la membroj estos gxustatempe anoncita.

2. Ekoturisma renkontigxo
Ekde la 1-a gxis la 8-a de julio okazos en Dobřichovice la Ekoturisma renkontigxo EKOTUR. Oni promenos en du grupoj (piede aux bicikle), plejparte tra Bohemia Karsto. A la jamaj aligxintoj el Cxehxio, Germabio, Belgio, Pollando kaj Kartvelio vi ankoraux povas aldonigxi, sed necesas decidigxi rapide, plej malfrue gxis la 15-a de junio, kiam ni devos nuligi la superflue rezervitajn lokojn (post tiu dato nur post anticipa demando). Pli da informoj:
<http://www.kava-pech.cz/ekotur>

3. UK en Florenco
Kiel jam estis anoncite, la karavano al UK forveturos el České Budějovice. Restis ankoraux en la auxtobuso liberaj lokoj, tial kiu volus eluzi eblecon viziti Florencon SEN partopreno de la kongreso, havas ankaux eblon: Por la prezo 7.770 CZK estas garantiata logxigejo kun matenmangxo kaj ekskursoj en cxirkauxajxon de Florenco (Elba, Pisa, Lucca...ktp). Pli da informoj: mirka.tomeckova@seznam.cz

4. Internaciaj ekzamenoj ILEI/UEA unuan fojon en Cxehxio
Atentu, ke la internaciaj ekzamenoj ILEI/UEA cxijare unuan fojon okazos en Cxehxio ekde la 6-a gxis la 8-a de oktobro 2006, enkadre de Internacia Paroliga Semajno InPaSem <http://www.kava-pech.cz/inpasem>. Temas tamen pri aparta arangxo, kiun eblas partopreni ankaux sen neceso cxeesti la tutan InPaSem. Cxar ILEI akceptis nian proponon de rabatita kotizo (500 Kč) por la membroj de CxEA, CxEJ, SKEF kaj SKEJ

(tamen nur kaze de aligxo antaux 31-a de auxgusto), temas pri perfekta ebligado de gajno de internacia pruvo de viaj konoj de Esperanto favorpreze kaj sen neceso longe vojaĝxi. Pli da informoj: chrdle@kava-pech.cz

5. Konferenco de Cxehxa Esperanto-Asocio

La 11-A konferenco de CxEa okazos de la 22-a ĝis la 24-a de septembro en la sudbohemia urbo České Budějovice. La aligxilojn vi trovos en la plej proksima Starto kaj baldaux ankaux sur <http://www.esperanto.cz>. Informoj: jirka.tomecek@post.cz

6. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (regula rubriko)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) pretigxas por sia dua ĝenerala asembleo okazonta julie en Velehrad (pri tio legu en aparta anonco). Lastatempe oni komplete ĝisdatigis la retpagxaron de la organizo. Nove troveblas tie ia. informoj pri baldauxaj arangxoj (Velehrad, Cxantorio), pri la tradukado de subtekstoj por filmoj aux pri la funkciado de la asocio.

En majo efektiviĝis ĝis nun plej grava sukceso de CxEJ, kiam la cxehxa nacia agentejo de la EU-programo "Junularo" decidis mone subteni internacian trejnseminaron pri "Lingvoj en interreto". La projekton verkis CxEJ kaj proponis ĝin al EU kune kun landaj sekcioj de TEJO el 6 aliaj landoj de EU. La seminario okazos inter la 4-a kaj 11-a de novembro 2006 en Brno kaj finiĝos per prezentado de la rezultoj en la scienca konferenco KAEST en Dobřichovice. Oni antauxvidas partoprenon de 19 junaj esperantistoj. Fondajxo "Junularo" kovras cxiujn organizajn elspezojn kaj 70% de vojaĝxkosto. La estraranoj de CxEJ, Dagmar CHVÁTALOVÁ kaj Marek BLAHUŠ, veturis la 7-an de junio al Prago por subskribi la kontrakton. La saman tagon vespere okazis tie kunveno de la Praga klubo de CxEJ, kun cxeesto de 11 homoj. Oni pridiskutis partoprenon de la membroj en someraj arangxoj, inkluzive de la komuna intenco de pragraj kaj brnaj ĝejnuloj okazigi viziton al la tendaro en Lančov. La Brna klubo de CxEJ vojaĝxos al Vieno, kie ili kun slovakoj kaj auxstroj sabate la 1-an de julio vizitos la Internacian Esperanto-Muzeon, apudan muzeon de globusoj kaj trarigardos la urbon.

Ankaux agoj de unuopuloj estas rimarkindaj: Marek BLAHUŠ reprezentis Cxehxion fine de majo en la Tutslovakia renkontiĝo en Piešťany kaj renomumigis komitatano de TEJO por Cxehxio por oficperiodo 2006-2008. Dagmar CHVÁTALOVÁ helpis alvarbi novajn anojn - dum majo aligxis 8 novaj membroj. Avinty LANAIKEY okazigis antaux la parlamenta baloto en Cxehxio enketon pri la sinteno de cxehxaj politikaj partioj pri Esperanto (rezultoj cxe <http://tandit.ecn.cz/volby2006.htm>). Tomáš KLAPKA dissendis al cxiuj cxehxaj parlamentanoj leteron informantan pri la raporto de profesoro Grin pri lingva situacio en EU. La leteron iniciatis la reta "Nitobe-centro pri lingva demokratio", kies retpagxoj pro engagxiĝo de CxEJ estas nun komplete disponeblaj ankaux al la cxehxa publiko (<http://cs.nitobe.info>). Rilate al tiu informkampanjo estis

modernigita ankaŭ la cxehxlingva pagxo ene de la cxefa reta
informejo pri esperanto - www.esperanto.net

Laux informoj en la Jarlibro de UEA por 2006, tiu cxi regula rubriko
estas la oficiala organo de CxEJ. Detalaj kaj aktualaj informoj pri
cxehxa junularo cxiam troveblas cxe <http://www.esperanto.cz/cej>

7. Junulara renkontigxo en Velehrad

Kunlabore kun IKUE, Cxhehxa Espesperanto-Junularo organizas sian
unuan internacian junularan renkontigxon, kiu okazos en Velehrad
inter la 8-a kaj 11-a de julio, paralele al la 59-a internacia
kongreso de IKUE. La junulara programo okazos samloke kaj kelkaj
programeroj estos komunaj por ambaux arangxoj. Dimanxe la 9-an de
julio tie kunvenos la gxenerala asembleo de CxEJ. Por la junaj
partoprenantoj eblos tranokti en propraj dormosakoj kontraux favoraj
prezoj. Demandojn kaj aligxojn (prefere gxis la 15-a de junio) sendu
al cej@blahus.cz, detalaj informoj trovigxas cxe
<http://esperanto.blahus.cz/cej/?velehrad2006>